

# VERDAJ

# SAKSO FONO

N-ro 4  
Oktoebro 2008

# KAJ Triskelo



kultura bulteno komuna al Esperantoamikoj en Saksio kaj Bretonio

kannadig sevenadurel boutin da vignoned an esperanteg e Saks hag e Breizh (br)  
bulletin culturel commun aux amis de l'espéranto de Saxe et de Bretagne (fr)  
gemeinsames Kultur-Bulletin der Esperanto-Freunde in Sachsen und der Bretagne (de)  
kulturny bulletin zhromadny přecelam Esperanta w Sakskej a Bretani (sb)

## Enkonduko

„Esperanto en la servo de mia hobbio“ estas la temo de jena nova numero de nia du-regiona bulteno. Niaj ĉi-jaraj kontribuemuloj elektis skribi pri arkitekturo kaj historio, biciklado, edukado, filatelo, politiko kaj psikologio. Certe la gamo de la ĉi tie prezentitaj hobbioj ne estas kompleta. Sed tio tute ne gravas, ĉar ekde la venonta jaro 2009 nia bulteno ne plu havos specifan temon: vi ĉiuj povos do ankoraŭ verki pri via propra hobbio. Per tiu decido la redakcia triumviraro Eitner-Philippe-Schumann deziras precipe, ke vi lasu kiel eble plej liberan kuron al via kontribuemo - por la ĝojo de la legantoj en Bretonio kaj Saksio. La kvina numero aperos en 2009 tuj post kiam ni estos rikoltintaj sufiĉe da tekstoj kaj bildoj por plenigi la tradiciajn 16 paĝojn.

Bretonoj bonvolu sendi siajn kontribuaĵojn al la retadreso [bert.schumann@free.fr](mailto:bert.schumann@free.fr) aŭ, se ne eblas, per poŝto al

Bert Schumann, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné.

Saksoj bonvolu sendi siajn kontribuaĵojn al la retadreso [glizje@aol.com](mailto:glizje@aol.com) aŭ, se ne eblas, per poŝto al

Benoît Philippe, Pillnitzer Landstraße 25, DE-01326 Dresden.

Oni abonas jenan bultenon nur ekabonante aŭ la bretonan bultenon LA VERDA TRISKELO aŭ la saksan bultenon VERDA SAKSO FONO. Vidu suprajn adresojn.

Plej agrablan legadon deziras al vi Bert Schumann (Cesson-Sévigné), Benoît Philippe kaj Steffen Eitner (Dresden)

## Esperanto, mia motoro

Nun Esperanto helpas min pluvivi. Mi estas 88-jara, ofte laca, precipe posttagmeze. Sed mi instruas Esperanton kaj mi devas reagi kontraŭ laceco, kiam miaj gelnantoj alvenas al mia hejmo por sia kurso. Fakte mi bone reagis. Kiam la gelnantoj foriras, mi konstatas

ke mi ne plu estas laca, sed preta fari ion ajn alian.

Esperanto estis grava por mi ekde mia lernado de la lingvo, antaŭ pli ol sesdek jaroj (en 1946). Mi estis lernantino en liceo, kiam mi sentis la bezonon de komuna lingvo por la homaro. En 1936

okazis interna milito en Hispanio. Rifuĝantoj alvenis al Francio. Mi diris al mia patro ke «ni ne komprenas ilin. Ni devus paroli komunan lingvon.» Paĉjo respondis ke «estas Esperanto!» Sed li ne povis doni al mi pli da informoj, nek adreson por lerni la lingvon.

En 1939 mi forlasis la liceon, kaj eklaboris kiel helpinstruistino. Mi ne plu pensis pri Esperanto, ĝis 1946 (dek jarojn post la respondo de mia paĉjo), ĝis legado de anonco en sindikata gazeto. "Apprenez (lernu) Esperanto(n). Adressez-vous à (turnu vin al) Monsieur Micard.» S-ro Micard estas la homo, kiu trovis la kastelon Grésillon (Grezijono), fama Esperanto-centro. Mi skribis al li, li donis al mi la adreson de mia instruistino, f-ino Perra el Lyon (Liono). Per korespondado, mi eklernis Esperanton.

Iam, f-ino Perra, kun la Esperanto-tasko, sendis al mi alvokon de la Internacia Civila Servo al volontuloj. Mi deziris koni tiun civilan porpacan servon kaj labori kun aliaj gejunuloj el diversaj landoj sur la laborkampo de la urbeto Châteaudun en Francio. Tien alvenis svedo, kiu parolis nek france, nek angle, nek germane. Li estis esperantisto, tre kontenta renkonti min. Por mi estis evento, ĉar tiu Karl estis la unua esperantisto renkontita. Mirinde! Post kelkaj monatoj da Esperanto-lernado per korespondado mi povis kompreni lin. Tiam mi konsciis la intereson, la valoron de Esperanto. Kaj mi petis korespondantojn. Samtempe mi ekkorespondis kun dekdu gesamideanoj. En la

urbo Hamburgo, mi skribis al s-ro Bunemann, Ida Grundel, Herman Theobald, Willy Freise: ili estis miaj plej bonaj korespondantoj.

Ĉar la internacia civila servo plaĉis al mi, la sekvan someron mi laboris eksterlande, en Nederlando (regiono Limburgo, proksime al la urbo Maastricht) kaj norde de la lando.

Poste mi iris al la germana Mühlheim/Ruhr, urbo multe detruita. Unu el miaj gelernantoj retrovis tion en arkivoj per interreto, kaj ŝi diris al mi: "Mi scias kie vi estis dum la somero 1948" ("Internationaler Zivildienst"). Per tiu mirinda interreto mi mem retrovis la nomojn de miaj kunlaborantaj kamaradoj.

Danke al Esperanto, mi eltrovis ĉion kio valoras en mia vivo. En tiu civila servo mi renkontis kvakerojn, inter kiuj mi nun havas geamikojn tre karajn.

Mi ekkonis mondcivitanojn kaj helpis, sendante legitimilkartojn al tiuj kiuj deziris ilin Esperantlingve.

Danke al miaj esperantistaj geamikoj mi ekkonis vegetarismon, naturismon kaj precipe la Movadon Freinet de moderna edukado, tiel grava por instruistoj.

Mi ekkonis ankaŭ la movadon JEAN, kreitan de Marc Rohrbach, svisa esperantisto, amiko de Claude Piron; tiu movado helpis min pozitive pensi. Tial mi, kiu ne estas forta, daŭrigis vivi.

Ĉio komenciĝis per Esperanto, mia unua fenestro malfermita al la mondo. Mi estas dankema.

Gaby Tréanton (Saint-Quay-Perros/Sant-Ke-Perroz)



biciklanto Emile Rébillon

Laŭdire, blua ĝi estas, kota mi vidis ĝin, kaj flava vidis ĝin la verkisto Julio Verno. Ĝi kunligas la Nigran Arbaron kun la Nigra Maro. Estas la eŭropa historia riverigo: de Atilo al Napoleono sen forgesi Ludovikon la 14-an, de otomana imperio al aŭstrahungara imperio, sed fi al la historio, scivolemuloj malfermos librojn kiuj parolas pri la afero.

Tiun dimanĉon, la 20-an de majo, 80 kilometrojn longa vojo kondukas min de Mulhaŭzo ĝis Friburgo, kaj jen la unua ŝoko de tiu nova aventuro, mi ne timu la vorton! Biciklaj vojoj tiom grandaj kiom belaj; en la urbo, bicikloj, ankoraŭ bicikloj, ĉie bicikloj, tiom da bicikloj kiom da aŭtoj, eĉ pli: nekredible!

Porbiciklaj ŝildoj ĉie staras, la tramoj plenplenas, malnovaj kvartaloj senaŭtas. Piedirantoj ĉie svarmas, la tendumejo proksimas al la urbocentro kaj iu sinjorino la francan lingvon bone parolas, kaj mia unua germana biero, estos ja multaj aliaj!

La morgaŭon, mi estas en *Donaueschingen*, la danuba fonta urbo. Evidente ascendo estis lacigea. Alveninte en *Sankt Märgen*, mi biciklis en la plej malfacila parto de la irvojo. Muĝas fulmotondro. Mi surmetas mian flavan pluv-

veston kaj rapide, sub pluvtromboj, malsupreniras. Pro rapideco mia biciklo tremetas, subite ankaŭ mi tremas sed pro timo. Mi provas halti sed en tiaj kondiĉoj ne estas facile, mi forte premas la bremsmanilojn kaj mi finfine sukcesas, kia timo! Mi forgesis restreĉi la elastan tenilon kies hoketo danĝere tanĝas la spokojn de la malantaŭa rado.

La pluvo intenŝigas, malvarmas, du ciklistoj preterpasas min, mi reatingas ilin kelkajn minutojn pli malfrue en ŝirmita busatendejo. Ili afable vizaĝesploras min kaj komentojn mi divenas. Mia ekskursiva biciklo laŭregule trapasas ekzamenon: pneŭoj, pendsakoj, kotŝirmiloj, lumiloj, ktp.

...Jes 3 dentradojn, ...La malgranda? 24, poste 36 kaj 46, ili ridetas. Kiom da dentoj en la buŝo? Malantaŭe la plej granda estas 28, sed se mi scius, estus 32, kiel la buŝdentoj.

Koncerne min, faltoj kaj kalveco kiujn mi havas de jam antaŭ longe, mia ventrodiketeco facile rimarkebla igas ilin perpleksaj, tamen por la momento mi ne dubas pri la sukceso de mia projekto. La vetero pliboniĝas, mi denove vojiras. Denove la vesto lokiĝis sur pendsako kaj jen *Donaueschingen*.

Varmegas, 33° ĉe la urbodomo, mi devas serĉi tendumejon aŭ gastejon ĉar malsekaj estas la biciklistaj pantalono kaj ŝuoj. Jen hotelo, kies estro bone parolas la francan. Mi malkroĉas la pendsakojn kaj mi konstata ke mankas mia vesto, felietono pludaŭras, la tenilo, ankoraŭ ĝi, mole pendas. Retrospektiva timo kaj kolero plenigas min, pri malatento, mi certe tanĝas katastrofon. Mi devas aĉeti novan veston sed mi decidis piede reiri sur la vojo.

Mi bone paŝas sed la kruroj doloras, la grimrado en la Nigra Arbaro postlasis spurojn sed post 40 minutoj estas rekompenco: sur vojturniĝo, mi vidas ĝin, mi ne povas kuri, kelkaj aŭtoj ruliĝis sur ĝi, nun striita per oleaj strekoj sed mi tenas ĝin!

Vespere mia taglibro elvokas al mi ke 50 km dum 6 horoj ne rezultigas eksterordinaran averaĝan rapidecon sed kia montara etapo!

Du aŭ tri fotojn de la fonto kaj jam aperas la urbo *Sigmaringen*. Mi memoras tiun imponan kastelon kaj mi rajtas polican eskorton indan je ŝtata ĉefo.

Hodiaŭ varmas. La indikilo pri «eŭro-bicikloŝoseo n-ro 6» estas nevidebla, mi dufoje trabiciklas la urbon *Munderkingen*.

Poste mi trapasas la urbon *Erbach*; ne estas tendumejo kaj la gastĉambroj estas plenaj. Du aŭstraj feriuuloj regalias min per glaso da biero kaj pedalante, mi alvenas iom post iom al la urbo *Ulm*, konata danke al *Einstein*.

Denove neniu tendumejo, mi antaŭvidas trapasi la venontan nokton subĉiele, feliĉe, belega estas la vetero. Mi plidaŭrigas iomete la bicikladon kaj mi trovas malgrandan plaĉan hotelon en la urbo *Thaltingen* kiu estas malproksima de *Ulm* je dek kilometroj. Mi vizitos ĝin morgaŭ: la malnovan urbon, ĝian fiŝkaptistan kvartalon, ĝian katedralon kun ties plej alta eŭropa sonorilturo (laŭdire: 161 metrojn).

Poste mi trapasas *Donauwörth*, *Neuburg*, *Ingolstadt* kun ĝia tendumejo: la plej multekosta en mia vojaĝo sed kiu ofertas minimumajn servojn. Mi ne forgesos tiujn francojn kiuj invitas min manĝi kune kun ili, tiun germanon kiu klarigas al mi

ke mi ne devas kampadi sub arboj ĉar fulmotondroni oni prognozas, sed arboj estas ĉie! Kaj tiun alian, simpatian viron, kiu signas al mi por akompani lin, tro kontenta forlasi la familian tablon kaj la 6 aŭ 7 personojn altabliĝintajn tie, por regali min per glaso da biero en la kampadeja trinkejo.

Ĉu estas necese paroli pri *Kloster-Weltenburg*? Mi mem miris vidante Bierglasegojn kun la papvizaĝo sur ili! Sed ankaŭ aliloke negoco kaj religio konkordas.

Poste mi devas ŝipveturi dum 3 kilometroj por atingi la alian bordon. Bileto kostas 17,50 eŭrojn, la prezo de mia manĝo, do mi decidas daŭrigi mian vojaĝon bicikle. La vojo malkrute supreniras kaj malsupreniras ĝis Regensburg, alia belega urbo kiu estas vizitinda. Esperantistino estis gastigonta min sed malfeliĉe, ŝi poŝtelefonas al mi ke ŝi ne povos ĉi-vespere gastigi min, mi estas elrevigita, kompreneble. Poste, mi promenetas tra la urbo kaj iom fotas.

Mi do tendumos en *Straubing*. Pluvas aŭ, pli ekzakte, pluvegas, vera diluvo, mi malvarmiĝas, kaj frosta estas la nokto. Hodiaŭ, mi suferas kontraŭan venton. Je la tria, mi alvenas en la urbo *Winzer*, en eta gastejo kiajn mi ilin ŝatas: ĉi-tie, bone odoras je biero, je tabako kaj bonaj manĝoj. Fiŝkaptistaj trofeoj pendas ĉe muro.

La mastro regalias min per senkosta glaso da brando por revarmigi al mi la korpon, mi petas ĉambron kaj varman manĝon. Li preparas porkan stufaĵon, fungojn, salaton kaj evidente bieron! Kiam mi aspektas revarmigita, li donacas al mi glaciaĵon.

Post duhora ripozo, mi estas invitata de ĉi-tiea grupo, fluas biero kiel Danubo ĉeflanke! Oni diskutas pri bagateloj, pri pensio, aĝo, monatenspezo, ktp. Je ĉiu trinkregalo, la mastro desegnas sur la biera kartoneto tiom da strekoj kiom da menditaj glasoj da biero, kiam necesas pagi, estas facile, sufiĉas kalkuli la strekojn sur la kartoneto. Mi ŝovas la mian en mian taglibron, kaj mi ne malkaŝos al vi la streknombron signitan tie. Laŭ vi, kiom da strekoj sur mia kartoneto estas?

La urbo *Passau* estas deviga trairejo, sed necesas havi lertajn krurojn por atingi la junulargastejon, mi kontentiĝos per kampado malsupre de la deklivo. Ankaŭ tiu urbo estas vizitinda, la katedralo kaj ĝiaj orgenoj, ekzemple.

Poste, jen la urbo *Linz* kaj ĝia bonkaraktara manifestacio: agrikulturistoj simple volas ke ilia lakto povu esti vendata je ĝusta prezo, ili proponas glason da lakto al ĉiuj kiuj volas en la bazaro. Komenciĝas diskuto en la angla lingvo, ili deziras al mi bonan vojaĝon. Ĉu mi trinkis glason da lakto laŭ via opinio?

Kun kanadana paro, mi vizitas la abatejojn de la urbo *Melk* post la urbo *Mauthausen*, beleta urbo kiu hodiaŭ kaŝas sian teruran pasintaĵon.

La urbo Vieno estas la lasta aŭstria urbo post *Enns* kaj *Grein*. Daŭre pluvegas, mi tre malfacile uzas mian ĉenelreligilon, pluvo kaj koto eble estas la kaŭzo. Bona purigo, iom da oleo kaj ĉio reordiĝas!

Mi atingas Bratislavon trajne, kaj vane klopodas kuracigi iksodan pikon en tri diversaj hospitaloj kaŭze de administraciaj ĉikanoj, lingva baro, evidenta malsincero



Passau

de kelkaj kunparolantoj. Estas ege malfacile esti kuracata kiam oni estas trapasanta fremdulo.

La bratislava gastigado estas agrabla, mi luas ĉambron en studenta restadejo, unu tranokto kostas proksimume 11 eŭrojn. Kontraŭ tiu prezo, mi restas du noktojn kaj esperantistaj geamikoj, kiujn mi antaŭe kontaktis, gvidas min dum du tagoj eĉ iomete nokte tra sia belega ĉefurbo.

Je la 7-a de junio, mi alvenas en Győr en Hungario ĉe Istvan Bago, ankaŭ li estas esperantisto. Hodiaŭ mi renkontis anglon kiu bicikladas de Munkeno kun stranga ekipaĵo, kun nur tendo kaj saketo sur la pakaĵportilo, jen ĉio! Ridinda mi aspektas, kun miaj kvin pendsakoj. Montrante al mi sian biciklon, li ridas: ĝi havas nur unu ĉenringon antaŭe kaj du diversajn dentradetojn malantaŭe, unu je ĉiu flanko de la rado. Kiam la vojo supreniras, sufiĉas malmunti la radon, inversigi la flankojn de la rado kaj remunti ĝin; ĉu vi komprenis? Ekvidante mian surprizon, li precizigas al mi ke li evitas la tro krutajn vojojn. Krome, morgaŭ li reciklados al Slovakio laŭlonge de la maldekstra bordo



de Danubo, ĉar laŭ mapoj, estas malebene inter la urbo Győr kaj la urbo *Esztergom*.

Mi pasigas ege agrablan vesperon ĉe Istvan, mi estas invitita manĝi tiom da ĉerizoj kiom mia stomako povas enteni. Ne necesas ripeti tion al mi, eĉ se mi pripensis pri antaŭvideblaj sekvoj de mia frandemo.

La irado al la urbo *Tata* estas lacegiga. Estas varmege, 33° je la 10-a. Miaj dudek kvin kilogramoj da pakajoj suferigas min en suprenirejoj. Se la du germanoj renkontitaj en la Nigra Arbaro vidus min hodiaŭ, ili ja ne rekonus min: mi certe retrovis vespan talion, mia biciklista pantalono malstrikas kaj tio ne malplaĉas al mi. Pri junula talio denove mi revas...

Mi ekvidas hodiaŭ la bazilikon de *Esztergom*, kiel interkonsentite, Jozefo estos atendanta min, sed neniu en la rendevuejo. Post telefonvoko, li alvenas, mi eraris, mi ne estas ĉe la ĝusta trafikcirklo. Tio ne gravas! Li gastigos min dum tri tagoj, kia afableco! Unu el liaj amikoj, vinberkultivisto, proponas viziti sian kelon, mi plezure konsentas kompreneble.

Ni improvizas ĥoron kiu kantas nur unufoje: ĉi-vespere. «Por malfrua gasto restas nur ostolo!». Oni kantas slovake, hungare, esperante kaj france. La fama kanzono «Kavaliroj de la ronda tablo» estas en la programo. Feliĉe morgaŭ estos dimanĉo kaj ripoztago! Ni vizitos la fortreson de *Višegrád* kaj la bazilikon de *Esztergom*.

Ĉu la slovaka biero estas pli bona ol la hungara? Mi ambaŭ ŝatas! Rilate al hungaraj vinoj, ili estas bonegaj.

London, la 11-an de junio, Jozefo akompanas min ĝis la bicikla vojo al Budapeŝto. Kia simpatia familio!



Budapeŝto

Antaŭ tri tagoj ni estis reciproke nekonatoj, sed ĉimatene, mi bedaŭre forlasas ilin.

Jen Budapeŝto, la temperaturo estas ege alta, veturiloj kaj kamionoj timigas min, ili estas ĉie: dekstre, maldekstre, antaŭe, malantaŭe. Mi devas senĉese min gardi pro trafiko kaj samtempe trovi la ĝustan irdirekton. Feliĉe, paro da biciklantoj vidante min embarasita signas al mi sekvi ilin. Ili bone konas la kvartalon kaj rapidas. Kvazaŭ sorĉe jen Danubo, fore sur la vidalvida bordo, la parlamentejo.

Je la 17-a, post mallonga biciklado en la urbo, mi loĝas ĉe Anna, alia esperantistino, kiu vizitigos al mi, nokte, la urbon, sed morgaŭ mi nepre devos foriri: la detala vizitado de la hungara ĉefurbo okazos dum la hejmenreiro; mi restados tie dum tri tagoj.

Meteorologie, la nokto estis varma, kaj forlasi Budapeŝton je la 7-a estas terure: veturiloj, busoj, kamionoj ĉie svarmas, kaj neniu biciklisto por gvidi min! Kaj kia varmece!

Je la 14-a, dekstre de la vojo, mi malkovras kampadejon: neimageble! Tie estas naĝejo, vera naĝejo, lageto kaj restoracio. Estas ege tro, tie mi pasigos la nokton! Mi miras pri la 100

kilometroj veturitaj en tiu varmece, sed fakte mi veturis ekde la 7-a, ĉimatene.

La kampadejestro avertas min ke minacas fulmotondro, kiel preskaŭ ĉiutage, vespere. Koncerne miajn malsekajn tukojn, lavite, sekigite, kvazaŭ gladite! Ek al la restoracio: gulaŝo, raguo spicita per papriko, du bieroj, plus morgaŭ matene, la ega matenmanĝo, inkluzive de la tenda lokoluo, kostis nur 4 700 forintojn, t.e. proksimume 20 eŭroj. Kiu proponas malplikoste? Krome, senpaga estis la rideto de la du kelnerinoj!

Mi forlasas la eŭropan bicikloŝoseon n-ro 6, kaj mi rapidas al la urbo *Kecskemét*, kie mi estas gasto de Laszlo, alia esperantisto: nekredible! Miaj gastigantoj certe konkuras pri afableco.

Post rapida vizito de la urbo, la urbodomo indas viziton, estas tempo por tagmanĝi, kaj poste por siesti... Laszlo decidis ke mi estas laca: kiom ajn mi provis klarigi al li ke mi veturis nur 35 kilometrojn, mi vane parolis, la siesto estas deviga! Poste li montras al mi siajn genealogiajn serĉaĵojn, pri sia familio kaj pri tiu de ... Sarkozy!

Se mi bone komprenis, la familio de nia Prezidento devenas de tiu regiono, cetere, la unua vic-urbestro nomiĝas ... Sarközy.

Ĉe preskaŭ ĉiuj hungaroj, oni parolas al mi, ĉefe Laci, pri la vasta Hungario, t.e. la Hungario de antaŭ la traktato de *Trianon* (04/06/1920) altrudita de la venkintaj aliancanoj. Tiu traktato deprenis du trionojn de la teritorio de Hungario, kaj pli ol duonon de ĝia loĝantaro.

Por ĉiuj hungaroj, tiu traktato estas simbolo de maljusteco kaj humiligo. Ankaŭ en Slovakio kaj en

Rumanio, oni longe diskutos pri tiu temo. Ŝajnas al mi ke la historio ne rakontiĝas sammaniere je ĉiu flanko de la limo. «Vero ĉi-flanke, eraro aliflanke».

Mi plu vojnos, ĉiam sub varmega suno, al *Szeged*. Ĝis revido Laci, kisojn al lia edzino kaj ek al Kiŝkunhalaŝo kie atendas min alia esperantisto, Istvan Barkányi. Ni rendevuis je la 14-a ĉe la akvoturo, sed en la urbo 2 akvoturojn mi vidas, feliĉe precizaj estas la klarigoj de Istvan, kaj mi estas evidente rekonebla kun miaj 5 pendosakoj, je la interkonsentita horo ni renkontiĝas.

Ĉu mi refoje insistos pri la eksterordinara akcepto de ĉiuj tiuj hungaraj familioj? Mi miras kaj sentas min iom konfuzata pro tia afableco.

Estas sabato, la 16-an de junio, kaj la fino de la lernojar. Ĉiuj gelernantoj renkontataj en la urbo estas elegante vestitaj: blanka ĉemizo, nigra pantalono, aŭ por la knabinoj, jupo. Ĉiuj iras al la mezlernejo, iuj kun florbukedo, aliaj kun kukoj, kaj ĉiuj estas akompanataj de siaj gepatroj, frato(j), fratino(j), onklo(j)...

Baldaŭ okazos la disdono de la premioj. En Francio oni tion faris antaŭlonge, sed mi neniam estis premiita, aŭ mi forgesis.

Poste ni vizitos la bazaron, mi tre ŝatas bazarojn; tie estas fruktoj, legomoj, floroj, viando kaj eĉ fiŝaĵoj!

Dimanĉon, alia Esperanta paro, Agnes kaj Paul, invitas min, la tago tro rapide pasas, bona estas la vino, ankaŭ la biero kaj la *pálinka* (brando), Paŭlo, mi tre ŝatas ĝin, sed ne ripetu!

London, alia Esperanta familio gastigos min, la familio Vago, ili konas Bretonion kaj mian urbon



Szeged

*Lorient.* Ili restaŭras domon. Kia belega domo kiam la laboroj de Heraklo estos finitaj!

Mardon, mi forlasis geamikojn el Kiŝkunhalaŝo. Mi nun devas dankegi vin pro via varmkora akcepto, via afableco. Kun vi, mi malkovris landon plenan de tradicioj, riĉan kaj diversspecan gastronomion, kaj vinojn tute simple bonegajn. Ankoraŭ dankon.

Jen *Szeged*, ankaŭ belega urbo, agrabla kampadejo laŭlonge de la rivero Tiso (hungare: *Tisza*), ĝia naĝejo kun akvo nature varma, resume la feliĉo. Sed terura fulmotondro trapasas je la 21-a nokte, mi decidas ekpreni mian tendon. Mi malcedas kaj eltenas dum 2 horoj, malfeliĉe elementoj el arkaĵoj de la tendo rompiĝas, sub la pluvo evidente!

La sekvan matenon, nederlandano segas la piedon de sia sunombrelo por fari improvizitajn kuplilojn, germano tra la urbo veturigas min per aŭto por aĉeti kelkajn aferojn por urĝa riparado.

Estas varmege, tukoj rapide sekiĝas. Pro varmeco, danĝera trafiko kaj laceco, mi decidas restadi

en Hungario, mi eniros Rumanion pli norde. Do mi trapasis la urbojn *Orosháza*, *Debrecen* kaj *Mátészalka*. Hieraŭ mi biciklis dum 140 kilometroj kaj mi estas laca, mi ne havas kuraĝon por serĉi kampadejon.

Bonege, jen hotelo, 50 eŭroj nokte! Ĉambro multekostas ĉi tie. Mi estos la sola kliento tiun vesperon.

Tablen je la 7-a, la scivolema mastro dronas en enuo, li deziras paroli: «Ĉu germano vi estas?», «Ne», «Ĉu anglo eble?», «Ne, franco, Atlantikan Oceanon ĉu vi konas?» ... , «Jes, per biciklo».

Nekredeble, se mi dirus al li ke mi biciklis de la luno, estus la sama afero mi opinias! Li rigardas min kun malfermita buŝo.

«Ĉu vi vizitos la tokajan regionon? Atentu pri grimpoj!»

«Ne Tokajon», «Sed kien vi biciklos morgaŭ?»

«En Rumanion»

«Mi ne ŝatas rumanojn», kaj li parolas pri supozaj rumanaj malbonaĵoj. Mi jam aŭdis tiujn malĝentilajn paroladojn. Fakte mi timis diri mian veran vojon sed miaj rumanaj geamikoj ne komprenus tiun konduton kaj kial mi devus kaŝi mian rumanan konataron?

La 26-an de junio post 102 kilometroj hodiaŭ, post 60 tagoj tra Eŭropo, post 44 bicikladaj tagoj kaj neniuj trapikaĵoj, mi alvenas feliĉa en Negreŝti-Oaŝ (Rumanio).

Ĉio estas en ordo! Por doni anekdoton: mi perdis pli-malpli 10 kilogramojn.

Miaj geamikoj atendas min fronte al la liceo.

Estas la komenco de nova aventuro en la regiono Oaŝ, Maramureŝ kaj *Bucovina*.

Emile Rébillon (Lorient/An Oriant)



Mi vojaĝis al Brazilo kun celo helpi en Bona Espero (BE). Mia vojaĝo estis pagita de la franca asocio de la Amikoj de Bona Espero ĉe la urbo *Vannes/Gwened* (suda Bretonio).

Mi restis en Bona Espero inter mezo de decembro 2007 kaj komenco de februaro 2008.

Antaŭ ol rakonti mian restadon, mi deziras prezenti tiun lokon, kiun kelkaj personoj el la Esperanto-movado jam konas.

Ĝi situas je 280 kilometroj norde de la ĉefurbo Braziljo, apud la urbeto *Alto Paraizo de Goiás*. Tio signifas: en la mezo de nenie, de la sovaĝa savano. BE situas inter 5 riveroj kaj havas sian propran artefaritan lagon kaj akvofalon. Alivorte, BE konsistas el 950 hektaroj da surfaco, sed nur 10 hektaroj estas uzataj kaj uzablaj pro diversaj kaŭzoj. Ses brazilaj esperantistoj fondis la „*Fazenda Escola Bona Espero*“ en 1957 kun la celo instrui al malriĉaj infanoj kaj ebligi al Esperantaj vojaĝantoj havi lokon por renkonti, helpi kaj instrui al infanoj. Sed mi estu preciza. Bona Espero ne estas disvastigejo de Esperanto, ĝi estas lernejo kies celo estas eduki infanojn. Esperanto tie restas internacia ilo.

Dudek jarojn post la fondo, post alvoko, alvenis *Giuseppe* kaj *Ursula Grattapaglia*, kiuj ankoraŭ nun administras BE. Tiu paro riparitis, konstruis BE ekde 1974. Preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj faratis de iliaj manoj. Ĉiuj arboj videblaj ĉirkaŭ BE estiĝis pro ilia laboro. Eble en iu retejo, legeblas ke *Giuseppe* kaj *Ursula* fondis BE, en ia senso jes, sed vere ne.

Mi alvenis je la tempo de Kristnasko. Dum tiu tempo mi renkontis la invititojn Roman Dobrzyński kaj lian edzinon. Li verkis la unuan libron pri BE, kies

titolo estas „Bona Espero, Idealo kaj Realo“. En decembro, la lernejo fermiĝas por du monatoj, sed restas dum tiu periodo dudeko da infanoj, kies antaŭa vivo estis tro malfacila por ke ili revenus al siaj propraj hejmoj. BE iĝas ilia hejmo por eta periodo. Mi devas konfesi, ke la unuaj noktoj kiujn mi pasigis tie, estis malfacilaj ĉar vidi la suferojn de kelkaj infanoj estas maldolĉa afero. Atentu, kelkaj restas veraj etaj diabloj.

Mi ne povas paroli je la nomo de la infanoj, kiujn mi vidis; mi riskus diri sentojn kiujn mi ne vivis kiel ili. Malgraŭe, mia restado en BE montris al mi plurajn aferojn. Unue paciencon, ĉar por tiu loko kiel oni vidas ĝin hodiaŭ, necesis 50 jaroj da laboroj, penoj kontraŭ rezistoj kaj ŝvitoj. La arboj, kiujn mi plantis, fruktas nur post 4 aŭ 5 jaroj. Herbejo iĝanta arbaro. Pacienco kun la personoj, kiuj vivas tie, kies reagojn mi komprenu. La infanoj kun siaj

malfacilaj historioj estis grava defio pri pacienco kaj komprenemo. Mia restado montris due ankaŭ persistemon ĉar la laboro estis iom malfacila. Pri Esperanto certas ke eĉ se mi ankoraŭ ofte eraras, mia nivelo pliboniĝis. Ĉu oni ne nomas tion lernejo de la vivo? Mi povus skribi pri la diversaj taskoj kiujn mi faris, sed necesus kelkaj paĝoj.

Mia laboro tie konsistis el plantado, akvumado de 500 arboj kaj prizorgado de la ĝardenoj. Mi pasigis preskaŭ miajn tutajn tagojn en la kamparo. Je la fino de mia restado, la infanoj fine akceptis min kaj mi povis ludi kun ili kaj doni al kelkaj iom da atento.

Hodiaŭ mi estas kiel la antaŭaj volontuloj, kiel ambasadoro de BE por reprezenti, prezenti tiun etan paradizon. Mi invitas homojn iri tien por doni iom da helpo.

Jonathan Chabert  
jonathanchabert@no-log.org  
[http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona\\_Espero](http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero)

## Vizitu

[esperanto.bretonio.free.fr](http://esperanto.bretonio.free.fr)

[www.eventeo.net](http://www.eventeo.net)

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

[e-d-e.org](http://e-d-e.org)

[e-d-e.eu](http://e-d-e.eu)

[esperanto-dresden.de](http://esperanto-dresden.de)

[lernu.net](http://lernu.net)

[www.uea.org](http://www.uea.org)

**EŬROPO-DEMOKRATIO-ESPERANTO**

## Esperanto kaj filatelo

Esperanto estas tre interesa temo por filatelisto pro tri kialoj:

1. Ĝi estas tre miskonata en la filatelistaro.
2. Interesaj Esperanto-filatelaĵoj troveblas je ne tro alta prezo.
3. Esperanto ebligas ligi kontaktojn kun filatelistoj tra la tuta mondo.

Komence, ŝajnas al mi interese precizigi, kio estas filatelo. Filatelo povas esti simpla, kiel eble plej ampleksa kolektado de poŝtmarkoj, kiujn oni zorge metas en belajn albumojn. Sed filatelo estas precipe kolektado de poŝtaĵoj serĉataj por munti eksponaĵojn kaj partopreni en

konkursoj lokaj, regionaj, naciaj aŭ internaciaj. Tio ofte postulas longan serĉadon kaj grandan paciencon. Munti tian kolekton estas kvazaŭ verki romanon: komence oni serĉas interesan intrigon, kiun oni poste rakontas pere de la filatela materialo, kiun oni disponas. Ofte mankas la plej taŭga peco, tiam oni serĉas ĝin, kelkfoje dum monatoj, kelkfoje sensukcese, kaj tiam necesas iomete modifi la rakonton.

Kompreneble la plej grava afero estas trovi materialon. Efektive, eĉ se multaj esperantistoj tion ne scias, ekzistas Esperanto-poŝtaĵoj, sufiĉe multaj, pli ol 2000 diversaj. Jes, vi ne mislegis: pli ol 2000 en la tuta mondo. Tio ne estas tre multe, sed tamen sufiĉas por ke filatelisto travivu agrablan serĉadon, kaj havu kelkajn plaĉajn surprizojn.

Oni distingas 4 specojn de Esperanto-poŝtaĵoj:

1. Poŝtmarkoj - proksimume 60 diversaj en la tuta mondo, do malmultaj sed plej ofte malmultekostaj
  2. Poŝtstampoj sur kovertoj aŭ poŝtkartoj - pli ol mil (atentu, kelkaj estas privataj kaj ne akceptataj en konkursoj - krom se la juĝantaro ne konas ilin, kio okazas...)
  3. Tutaĵoj (poŝtkartoj aŭ kovertoj kun poŝtmarko surprisita) - pli ol 800
  4. Diversaĵoj kiel ekzemple rekomarkoj (markoj de registritaj poŝtaĵoj), cenzurstampoj, ktp. Atentu, glumarkoj ne apartenas al filatelo, ĉar ili privataj ne havas oficialan poŝtan uzon.
- Tiu materialo troveblas ja ĉe negocistoj, sed ne ĉe ĉiuj. Ĉar la mendado ne estas tre ampleksa, multaj el ili ne scias la ĝustan valoron de la Esperanto-poŝtaĵoj; pro



tio, kelkfoje prezoj estas tro altaj, sed ankaŭ kelkfoje subtaksitaj, kaj eblas havi tre agrablajn surprizojn, ni do estu tre atentemaj. Sed la plej interesa fonto estas la esperantista filatelistaro mem; ĝi havas sian tutmondan asocion „Elf Arek«, kiu eldonas revuon „LA VERDA LUPEO« kaj grandan katalogon, por ke la membroj sciu ĉion, kio aperis kaj aperas pri la temo. Pere de tiu asocio, la Esperanto-filatelistoj povas interkonatiĝi kaj interŝanĝi materialon je tre interesa prezo.

La temo „Esperanto« estas tre ŝatata en la filatelistaro, ĉar pli originala ol la kutimaj „papilioj«, „trajnoj«, „floroj«, ktp., kiuj abundas en konkursoj, kaj Esperanto-eksponaĵoj povas atingi tre altan nivelon. Nuntempe, la plej fama estas tiu de brazila amiko mia, James Rezende Piton; ĝi nomiĝas „Babelo estu detruita« kaj regule ricevas altajn premiojn en internaciaj konkursoj.

Inverse, filatelo estas tre interesa por esperantistoj, ĉar ĝi ebligas ligi rilatojn kun samhobianoj tra la mondo, kaj multe ekscii pri la historio de la lingvo mem.

Jean-Pierre Ducloyer (Montfort/Monforzh)

La profundigantaj rilatoj inter Germanio kaj Rusio en la mezo de la 19-a jarcento kaŭzis rapidan kreskon de la dresdena rusa komunumo kaj decidon, konstrui propran preĝejon. La dresdenano *Alexander Wollner*, de rusa deveno, donacis la konstrugrondon, tri kvaronoj de la financaj rimedoj por la konstruo – 520 000 markoj – estis disponigataj de la imperia ŝtatkonsiliano *Simeon von Wikulin*, la resta kvarono venis de la rusa ortodoksa paroko, de la imperiestra-rusa familio kaj de la rusa Sankta Sinodo en Sankt-Peterburgo.

Laŭ la modelo de la moskvaj preĝejoj el la 17-a jarcento oni konstruis la dresdenan preĝejon laŭ projekto de la german-devena arkitekto ĉe la imperiestra-rusa kortego *Harald Julius von Bosse* sub la gvido de la dresdena arkitekto *Karl Robert Weißbach*. La 25-an de aprilo 1872 en ĉeesto de la tiama dresdena urbestro *Friedrich Wilhelm Pfotenhauer* (1812-1877) okazis la meto de la fundamenta ŝtono kaj post dujara konstruado la 6-an de junio 1874 oni konsekris la novan preĝejon.

Iom ekstere de la urbocentro, inter la ĉefstacidomo kaj la universitata kvartalo, la rusa ortodoksa preĝejo prezentas ĉarman kontraston kun la cetera arkitektura pejzaĝo de Dreseno. La komplekse strukturita konstruaĵo el brikoj estis tegita ekstere per sabloŝtono el la sufiĉe proksima vilaĝo *Cotta*.

La kornicoj kaj la pilastroj estas ekzemploj de la ornama riĉeco de tiu preĝejo. Super la

antaŭkonstruaĵo elstaras la 40 metrojn alta sonorilturo.

La kerna konstruaĵo estas kronita per 5 turoj kun blujaj bulbokupoloj

kaj oritaj rusaj krucoj, kiuj simbolas Kriston kaj la kvar evangeliistojn. Tipa karakterizaĵo de rusa arkitekturo estas la duoblaj vicoj da kilformaj gabloj piede de la turoj, la tiel nomataj "kokoŝniki".

Same kiel ĉiuj ortodoksaj preĝejoj, la konstruaĵo estas orientita, tio signifas ke ĝia ĉefakso estas turnita al oriento. La konstruaĵo estas strukturita en tri ĉefaj partoj: malgranda vestiblo, efektiva preĝejo kaj altarejo aŭ plejsanktejo.

Laŭ granda perono kaj tra la preĝeja portalo la vizitanto alvenas al malgranda vestiblo kaj poste al la preĝejo, ĉe kies flankoj aperas absidoj. En la norda absido, kiu estas uzata por memorfesto kaj solenoj pri mortintoj, troviĝas kaj ligna kruco pripentrita per krucumita Savanto kaj sarkofago, kiu simbolas la tombon de Kristo. La suda absido estas la loko de la koruso dum la ortodoksa Diservo.

La foresto de preĝeja seĝaro (escepte de la plej maljunaj parokanoj, la ortodoksaj kredantoj partoprenas stare en la Diservo – laŭ malnova eklezia tradicio, al kiu sin submetis ankaŭ la caro kaj la tuta imperiestra korteganaro) ebligas mirigan impreson de la beleco de la konstruaĵo. Centro kaj allogilo estas la ikonostazo (la ikonosepo), kiu apartigas la sanktejon disde la cetero de la preĝejo. Ĝi estas konstruita el blanka marmoro el la toskana urbo *Carrara* kaj enhavas tri pordojn, kiuj kondukas en la altarejon. La duklapa ĉefa pordo en la mezo – la reĝa pordo – estas provizita per riĉe oritaj lignoskulptaĵoj kaj prezentas la portretojn de la kvar evangeliistoj kaj la Anunciacion. Tra ĉi tiu pordo oni portas dum la liturgio la korpon kaj la sangon de Kristo kaj ankaŭ la sanktan evangelion.



La ordo de la ikonoj sekvas en ĉiuj ortodoksaj preĝejoj la saman skemon: dekstre apud la reĝa pordo la ikono pri la Redemptoro, maldekstre la bildo pri la Dipatrino. La suda flanko montras la portreton de la arkianĝelo Gabrielo, dekstre de ĝi troviĝas la ikono pri la patrono de la preĝejo, sankta Simeono de la Mirakla Monto. Arĝenta arkoforma tabulo memorigas pri *Simeon von Wikulin*, la donacinto de la preĝejo.

La supra vico da ikonoj konsistas el kvar brustbildoj de sanktuloj: maldekstre Nikolao el *Myra* kaj Mitrofano el Voroneĵo, dekstre la apostolo Petro kaj Tiĥono el Sadonsko, inter ili maldekstre la simbolo de la Malnova Testamento, la tabeloj kun la dekalogo, kaj dekstre la eŭkaristia kaliko kiel simbolo de la Nova Testamento. En la mezo, super la reĝa pordo kaj la simbolo de la Sankta Spirito, bildo de la Sankta


Manĝo okupas centran lokon. Ĉi ĉiuj ikonoj estas pentritaj sur ora fono fare de *James Marshall* (1838-1902), kiu faris ankaŭ la kvar ovalajn bildojn sur la plafono kaj la proscenian frison de la dresdena Semper-operejo.

Antaŭ ĉiuj ĉefaj ikonoj kaj ankaŭ sur ambaŭ flankoj de la pupitro ("*Analoj*") kun la respektiva festotaga ikono staras bronza kandelabroj, je kiuj kredantoj dum la Diservo eklumigas siajn oferkandelojn. La spaco antaŭ la ikona muro ("*Ambon*") estas plialtigita per tri ŝtupoj kaj apartigita disde la cetera preĝeja spaco per balustrado el blanka marmoro.

La plejsanktejo, la altarejo estas enirebla nur por viraj personoj, kiuj havas rektan rilaton al la altarservo. Meze de la ejo troviĝas la altartablo ("*Prestol*") riĉe kovrita per brokato. Sur ĝi staras – kiel jam antaŭe en la Templo de Jerusalemo – la sepbraka kandelabro, kiu ĉi tie simbolas la sep kristanajn sakramentojn. Antaŭ ĝi troviĝas la arĝenta tabernaklo en formo de preĝejo, en kiu estas konservataj la Sanktaj Oferotaĵoj (pano kaj vino). Ankaŭ la "*Antimins*", simbola mortotuko de Kristo kun religiaj figuraĵoj, la pompe bindita evangelio, la benokruco kaj la krismujo, la sankta "*Myron*", havas sian tradician lokon sur la altartablo. Maldekstre de la altaro troviĝas la prepartablo, sur kiu antaŭ komenco de la liturgio plenumiĝas la "*Proskomodie*", t.e. la preparo de la Sanktaj Oferotaĵoj por celebri la eŭkaristion.

La sakristioj, kiuj limas al ambaŭ flankoj de la altarejo, estas uzataj por konservado de la ornatoj, t.e. la riĉaj liturgiaj vestoj. En ili troviĝas ankaŭ diversaj preĝejaĵoj, plejparte aĉetitaj per mondonacoj.





Ankaŭ ĉe la dresdena rusa preĝejo la eventplena germana historio ne pasis sen lasi profundajn spurojn. Dum la unua mondmilito oni forigis kaj fandis la 8 preĝejajn sonorilojn por militaj celoj – la plej granda sonorilo pezis preskaŭ tri tunojn. Fine de la dua mondmilito bonŝance nur kelkaj partoj de la preĝejo estis detruataj dum la elaera bombado de Dresdeno la 13-an de februaro 1945. La meza altarfenestro, kiu (farita ankaŭ de *James Marshall*) figuris la resurekton de la Sinjoro, perdiĝis por ĉiam. La krono de la sonorilturo kaj tri el la kvin kupoloj estis frakasataj, la tegmento kaj partoj de la ilaro brulis sed tamen la konstruaĵo konserviĝis meze de ruinejo.

Kvar jarojn, de 1948 ĝis 1952, daŭris la malaperigo de la militdamaĝoj. Danke al donaco de

katolika pastro el la sufiĉe proksima vilaĝo *Wilsdruff* oni povis en 1973 provizi denove la ĝis tiam mankantan sonorilon kaj en 1975 aldoni al ĝi kvar pliajn sonorilojn mulditajn en la turingia urbo *Apolda*.

Danke al subteno de la saksa oficejo pri flegado de monumentoj, de la federacilandna ĉefurbo Dresdeno, de la evangelia kaj katolika eklezioj kaj de multaj publikaj kaj privataj donacintoj oni povis en 1991 komenci kompletan rekonstruadon de la konstruaĵo.

Hodiaŭ la bluj kupoloj kaj la oritaj krucoj lumas novbrile kaj montras al vizitanto la vojon al juvelo de la urbo Dresdeno: la rusa ortodoksa preĝejo.

tradukita de la komisiono "Esperanto por turismo en Dresden" (fondita 29.09.2006)

La unua impresio, oni diras, estas la plej bona. Ĉu ni esperantistoj ĉiam memoras pri tio, "prezentante" al iu Esperanton? Plej ofte tio okazas per publika interparolado, kiam ni renkontas aŭ akompanas esperantiston sur la strato, en tramvojo, gastejo, kie neesperantistoj vole-nevole aŭskultas. Kiel patrino deziras, ke ŝia infano bone impresu, tiel ankaŭ esperantistoj por Esperanto devas same klopori, sed ili ofte atingas – la malon.

Neniu estas antaŭdestinita, propagandi Esperanton per publika interparolado, ĉar ĉiu antaŭe devas eduki sin por tio. Efektive kelka malutilas en tiu rilato. Jen sufiĉa kaŭzo por pripensi, provi kaj por okaza sinreteno. Por kelkaj estus pli bone, esperante silenti pro Esperanto. Verda stelo sur la vesto de respektinda, silenta homo pli bone efikas ol vanta interparolado de frazuloj. Ĝuste tio ĉi (...) naskas antipation, eĉ mokon.

Tamen ni devas publike interparoli, ĉu por propagandaj, ĉu por privataj celoj, sed nur laŭ la ĝenerala regularo de la moro: Do dece kaj laŭnature kun bona prononco, ne tro rapide aŭ eĉ kriante. Alie la aŭskultantoj perceptas malbelajn sonojn. Precipe oni ne forgesu paŭzi por spiri kaj

ĉesi paroli ĉar alie interparolado ne estas suferebla. Krome unu el la plej gravaj reguloj estas: ne altrudi sin. Ne ĉiu esperantisto deziras aŭ devas paroli. Do facile oni povas ridindigi Esperanton; tiom, ke serioza samideano hontas, antaŭ la okuloj de neesperantistaj aŭskultantoj porti la verdan stelon.

La plej grava postulo estas bona prononcado. Estas hontige por ni germanoj, ke eksterlandanoj bezonas atentigi nin pri tio. Oni faru klaran diferencon inter simlsonaj konsonantoj, bone akcentu, kaj evitu ĉian dialekton.

Fine la sukceso de publika interparolado dependas de preciza (korekta kaj logika) esprim-maniero, nome de kompletaj, kompreneblaj frazoj, koncizaj demandoj kaj trafikaj respondoj. Per tio oni atingas tujan interkompreniĝon, kiu evitigas oftajn ripetojn de vortoj aŭ frazoj.

Kian impreson do la interparolado devas vekti? La eksterulo devas juĝi: La esperantistoj estas bonmoraj homoj; ili posedas la lingvon; ĝi estas bela kaj sendube uzebla. Ĉi tiuj favoraj juĝoj pri Esperanto kaj ĝiaj anoj esence helpas la sukceson de nia lingvo.

P. Höfer (Dresden) (tiu artikolo aperis en LA INSTRUANTO en junio 1911)

## Ĉiam novaj ideoj

La granda komplekseco de la vivo estas interesa. El kelkaj interesoj kreskas gravaj hobiaj.

Mi intense sekvis la evoluon de la radia tekniko, mi interesiĝis krome pri sekvaj temoj: aŭskultado de tutmonda radiofonio, Saksa kaj Dresdena historioj, monument-flegado, urb-evoluo kaj demandoj pri urba formo, arkitekturo, printaĵoj ktp...

Tambur-kurso estis por mi bona kompenso. Nature por mia sinteno estas, ke mi trovis sur tia vojo ankaŭ Esperanton.

Tiun lingvon mi konsideras kiel instigon disvastigi ideojn.

Mi strebas al plibonigo de tutmonde aplikeblaj kultur-teknikoj, kiuj estas kiel eble plej neŭtralaj. Neeviteble novo




Ĉĉ Ĝĝ Ĥĥ Ĵĵ Ŝŝ Ŭŭ  
 Ĉĉ Ĝĝ Ĥĥ Ĵĵ Ŝŝ Ŭŭ

estigas. Ankaŭ se la rezultoj ofte ne estas komprenataj de aliaj homoj, tiaj agado kaj metodo estas agrabla sperto.

Kvalifikigo kiel komunikil-dezajnisto intensigis ankaŭ mian okupigon pri la Esperanto-tipaj literoj. Nenian novan lingvo-formon mi proponas, kiam mi proponas apartajn signojn. Zamenhof ne eraris, sed ĉu li estis tipografisto? Mi ja ne estas perfekta, sed gojo plu pensi pri novaj literoj estis por mi tro granda.

Mia intereso pri signoj videblas sur mia projekt-paĝo [www.kafejo.de](http://www.kafejo.de). Interalie mi tie proponas "natur-proksiman" son-skribon, kiu estas kvazaŭ lazlonga sekca bildo de la homa parolilo.



kafejo.de  
[www.steffen-eitner.homepage.t-online.de](http://www.steffen-eitner.homepage.t-online.de)  
[eo.wikipedia.org/wiki/Deksesuma\\_tempo](http://eo.wikipedia.org/wiki/Deksesuma_tempo)

Ankaŭ la kalkul-maniero baze de la nombro 16 min interesas. Ne nur ĉe komputil-programoj oni aplikas la deksexuman sistemon, ekzemple por fiksi kolor-valorojn. Tial mi evoluigis (ne kiel unua) aŭtonoman signo-sistemon kaj "lingveton" surbaze de la lingvo Esperanto. Tiu "lingveto" rezultas el multaj logikaj konsekvencoj kaj kapablas helpi malsamlingvanojn interkomprenigi.

— 0 nul	L 1 unaf	ll 2 taf	lll 3 taf
ll 4 kvaf	lll 5 taf	llll 6 taf	lllll 7 raf
llll 8 okof	lllll 9 naf	llllll 10 akaf	lllllll 11 buf
llllll 12 cif	lllllll 13 daf	llllllll 14 eapof	lllllllll 15 taf

Laz la deksexuma sistemo oni difinis apartan dividon de la diurna tempo, kiun oni nun uzas por interretaj horloĝoj. Mi mem partoprenis en ĉi tiu esplorado. Oni difinis ankaŭ gradon de longitudo de nova universala tempo en Florenco (Italio). Ĉirilate mi proponis pli praktikan kvanton da tempo-zonoj.

Tiel venas ĉiam novaj ideoj al mi, ekzemple ideoj pri Esperanto-kafejo por Dresdno aŭ ideoj pri la estonteco de la urboj ktp... Steffen Eitner (Dresden)

